


SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

“ ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE



Granda propaganda kunveno en Stockholm. D-ro Szilágyi demonstracias sian instrumentodon.

N:r 2.
N-o 2.

Februari 1934.
Februaro 1934.

Pris 25 öre.
Prezo 25 oeroj.

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

Redaktör: Bernhard Eriksson.

Postadr.: Biblioteksgat. 30, Stockholm.

Tel. 10 53 27, 11 27 53.

Prenumerationspris: Helt år kr. 2:50.

Lösnummer 025.

Annonspolis: 15 öre pr mm.

Utkommer en gång i månaden.

SVEDA ESPERANTO-GAZETO

Redaktanto: Bernhard Eriksson.

Adreso: Biblioteksgatan 30, Stockholm.

La administracio: Box 698, Stockholm.

Anonco pri korespondado kostas

2 respondkuponojn.

Abono eksterlanda: 1 jaro 3:— sv. kr.

Svenska Esperanto-Förbundet

(Sveda Esperanto-Federacio)

Adress: Stockholm 1.

Sekretariatets adress: Fredsgatan 4.

Postgirokonto N:r 2012.

Arsavgift för direkt anslutna medlemmar kr. 5:— inberäknat pren.-avgiften för Svenska Esperanto-Tidningen.

Ordförande: Paul Nylén, Huddinge.

Telefon: Huddinge 279.

Sekr.: Ernfrid Malmgren, Heleneborgsgat. 6, Stockholm. Tel. 41 03 04.

Svenska Esperanto-Institutet

Postadr.: Box 698, Stockholm.

Postgiro 515 11.

Avd. för examens- och språkfrågor: Rektor Sam Jansson. Tel. Lidingö Villastad. 295. — Avd. för ekonomi, statistik, kurser: E. Malmgren.

Sv. Lärares Esperanto-Förbund

(Sveda Instruista Esperanto-Federacio)

Ordf.: Thorsten Torbjär, Mariagat. 15, Göteborg.

Sekr.: Gustav Rimberth, Kommendörs-
gatan 41, Göteborg.

Kassör: Oskar Svantesson, Karl Johans-
gatan 61, Göteborg.

Arsavgift 2:— kr.

Läroböcker, Ordböcker

m. m.

Systematisk kurs i Esperanto. Av Seppik-Malmgren. En enkel och lätt lärobok för nybörjare... 0:75

Esperanto utan förkunskaper. Av Harald Skog o. Sam Jansson. 0:50

Övningsbok till d:o. 0:50

Praktisk lärobok i Esperanto för kurser och självstudium. Rik på förklarande exempel. 2:—

Kurs i Esperanto. Del I. Av Fritz Lindén. Synnerligen enkel. .. 0:90

D:o. Del II. Läsebok. 0:90

Lärobok i Esperanto för A.B.F. och andra studiecirklar. Av Jan Mas-
siak. Inb. 2:50

Kommentarer till d:o. 1:—

Esperanto-Kurso. Av V. Setälä. En enkel och trevlig läsebok. Ill. 0:50

Esperanto-Grammatik. Av Lärov-
adj. Nils Nordlund. 1:50

Nyckel till Esperanto. Miniaturläro-
bok med ordlista. 0:10

Dubbel Fickordbok i Esperanto. Av Carl Ohlsson. Svensk-Esperantisk o. esperantisk-svensk ordbok. 1:50

Esperantisk-svensk Ordbok. Av P. Nylén. 232 sid. Häft. 3:75

D:o, inb. i hållbart klotb. 5:—

Svensk-Esperantisk Ordbok. Av G. H. Backman. För tillf. slutsåld.

Esperanto-Ordbok. Av N. Nordlund. 1:—

Prepositionerna i Esperanto. Av N. Nordlund. 0:75

Fundamenta Krestomatio. Av D:r L. L. Zamenhof. Läsestycken avsedda att utgöra mönster för god esperantostil. 3:25

Dialogoj en Esperanto. Por kursoj kaj grupaj kunvenoj. Av Einar Dahl. 32 sid. 0:50

Förlagsföreningen Esperanto n. p. a.

Box 698, Stockholm 1. Postg. N:r 578.

Tel. 31 65 01.

Kont. o. exp.: Sveavägen 98 5 tr. Kl. 9-17.

Order överst. 10 kr. försänd. portofritt. Vid ins. av förskottslikvid för mindre order bif. 10 proc. till portokostnader. Fullständig prislista på begäran gratis och franko.

ESPERANTO-TIDNINGEN

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

Letero de tie, kie finiĝas la mondo.

F. SZILÁGYI

»Gallio naskis nin, ni vidis Afrikon, ĉerpis el Ganges, sed ni haltis ĉi tie, kie finiĝas la mondo»

Tre vagemaj kaj kuraĝaj francoj ĉizis en lignon la suprajn vortojn en la jaro 1681, kiam ili alvenis Jukkasjärvi-n, tiun duone laponan, duone finnan komunumon. Ili haltis ĉi tie — pli ol 200 kilometrojn trans la polusa cirklo, certe ankaŭ tiam estis bela, malvarma, vintra tago kaj la purpura rebrilo de la sube naĝanta suno rozkolorigis la silentemajn montojn kaj melankoliajn neĝkampojn de la mondofino. Eble estis la unua horo — tagmeze — kiam la lasta punkto estis borita en la lignotabulon, la ruĝa brilo subenflugis en la misteran profundon de la tero; kvazaŭ giganta rajdanto, alvenis la vespero sur la dorso de la polusa vento kaj ĉirkaŭ la dua horo jam estis preskaŭ tute mallume, kiel hodiaŭ, frosta neĝo kaj glaciosplitoj ĵetigis al la vizaĝo de la trokuraĝaj sudlandanoj. Ili eble povis vidi ankaŭ tion, kion al mi ne permesis la kaprica ĉielo, la fean kolorpompom de la Norda Lumo.

Jes, tie ĉi proksimume finiĝas la mondo. Transe: kelke da fervoj-garddomoj, aŭ vilaĝoj, kun 5—6 domoj, pli

norde nur ja laponoj vagadas kun siaj boacaroj (norda cervo), el kiuj jen la praa malamiko, la lupo postulas imposton, jen la multe pli bonhumora kamarado, la urso pretendas parton. Mi staras meze de la vasta, venta, neĝa valo, antaŭ mi ruĝiĝas en pala purpuro la malvarma mondofino, dezerta kaj tamen alloga bildo, reviga, sovaĝa, sensona harmonio. Sed

.... sed malantaŭ mi la pejzaĝo ekvivigis, etuloj, vestitaj en bluan kaj verdon surprizas la blankon de la neĝo per la printempaj koloroj. Jes, la leciono finiĝis en la lapona lernejo, kaj la etaj laponfiguroj, ruĝvizaĝaj, larĝkapaj krie



La bildo: Maljuna lapono.

atakas la sanktan silenton. Etaj gekna-
boj, kiuj neniam sentas malvarmon. Sur
la kapoj kresta ĉapo kaj la molaj paŝoj
neniam eraras sur la glita neĝo. Sur la
piedoj: fel-ŝuoj.

Nun stranga procesio proksimiĝas al
la izola, blukolora preĝejo, — tricentjara
lignokonstruaĵo — jes, tri malrapidaj, so-
lenmovaj glitveturiloj, sur la unua kuŝas
ĉerko, helkolora ĉerko, ornamita per vig-
la verdaĵo. — Finna enterigo — diras
miaj samideanoj. La veturiloj proksimi-
iĝas al la preĝejo, sed poste preteriras
ĝin. Unue oni devas prizorgi la vivantan
korpon La parenaro trinkos kafon
kaj poste okazos la enterigo. Kaj post la
enterigo oni denove manĝos kaj trinkos.

Nun venas la instruisto de la laponaj
infanoj, simpatia, afabla, juna homo kaj
dum la interpretado de miaj amikoj ape-
ras antaŭ mi mondo, pri kiu oni devas
paroli, ĉar tiuj vortoj malkaŝas mirin-
dan, noblan kulturon. Mi estas ĉe la
mondfino, sed en Svedlando Aŭskul-
tu nur:

7000 laponoj vivas en Svedlando. Prok-
simume la duono de tiu nombro vivas
nomade. Tamen inter ili ne estas analfa-
beto. Kiam antaŭ kelkaj jardekoj la sis-
tema instruado de la laponoj komenciĝis,
la instruistoj devis sekvi la vagantajn la-
ponojn, ili iris de tendo al tendo kaj ofte
ili instruis nur du—tri homojn, aŭ infa-
nojn. Nuntempe la situacio estas tute
alia. La instruisto vagadas nur somere
kun la laponoj kaj la lernejo havas apar-
tan tendon kaj antaŭ la vintro oni kolek-
tas la infanojn por la vintra lernado, kio
okazas ekz. en Jukkasjärvi. En tiu vila-
ĝo ili pasigas kvar monatojn, plejparte
je la kosto de la sveda ŝtato. Ili loĝas
kiel kutime en tendoj, kaj laponinoj, la
dungitoj de la ŝtato, prizorgas ilin. Inter
la studobjektoj pendas la boac-kaptilo:
la »lasso», sed ne mankas en la tendo la
dentobrosoj. Inter la legaĵoj mi vidas
unu, kies titolo estas: »Kiam la knabo
volas rajdi sur boaco.» La laponidoj ha-
vas bonan sorton, afablan varmon en la
tendoj, tamen, kiam mi demandas unu el
ili, kie li fartas pli bone, ĉu ĉi tie, aŭ en
la nomada tendo, li senhezite respondas:
— hejme. — Absolute ne embarasas lin
la konfuziĝo, kiu min regas, kiam mi
pensas pri tio, ke lia hejmo ne estas sen-
movna. Sed poste mi bone komprenas: an-
kaŭ mi estas nomado de nia lingvo, Es-
peranto

Mi rigardas la benkojn de la infanoj.

Lapuja vintra nokt'.

Lapuja vintra nokt'.

*En nokt' polusa nun Lapujo dormas,
sub neĝ' profunda sin la vivo kaŝis.
en mortsimilan staton aliformas
la vintra Dio ĉion, kie paŝis.*

*Ĉiel' super la montoj ŝanĝobrilas
kaj kontraŭ ĝia alta stela ponto
la torĉoj de polusa lumo brilas,
radie el — mi kredas — viva fonto.*

*Arbar' senfina ĉirkaŭe staras
songante sorĉajn songojn pri Estonto,
pri diaj manoj, kiuj ĉion faras,
laponaj »Jubmel», la ĉielsorĉanto.*

*Kaj iu staras en dezertvilaĝo
revante pri la vivo supertera,
kiel sopiras aglo el la kaĝo
al la flugado alta kaj fiera.*

Verkis en Arjeplog la 26an de decem-
bro 1933 *Hj. Dahlén.*

En la benko de 12-jara knabo mi vidas
du tabelojn. Unu el ili montras la tagan
temperaturon, la alia estas grafikono de
la atmosfera premo. Ho, tiuj laponoj!
Ankaŭ cetere pereadas la laponaj roman-
tilko, ĉar se la aŭtuna vespero estas tro
malbona, tiam la laponoj uzas la moder-
nan teknikon kaj nek piede, nek boace
ili pluiras, sed mendas ŝarĝaŭtomobilon
el Kiruna..

Mi ekscias de la instruisto, ke la virga
inteligento de la laponidoj facile venkas
la malfacilaĵojn kaj speciale ili eminen-
tas en la lingvostudoj. La raso estas sa-
na, relative ili vivas higiene, kvankam mi
ne kredas, ke la svedaj sapfabrikistoj
pri ili riĉiĝas. Kaj la kiruna-a malsan-
ulejo ofte havas laponajn pacientojn, sed
laŭ mia kredo, certe la indiĝenaj sorĉ-
istoj ne devas ĉesigi sian komercon pro
la konkurenco de la kuracistoj.

Nun sekvas du-kilometra promenado.
Denove: la melankolia pejzaĝo de la
mondofino, kiun sen transiro interrom-
pas la intima impreso de bela, malgran-
da konstruaĵo. Ni staras antaŭ la lapo-
na maljunulhejmo: ĉiu laponino, kiu mal-
juniĝas kaj deziras vivi ĉi tie, povas esti
hejmano, sen, ke oni tre multe reklama-
cius siajn legitimilojn kaj skribdokumen-
tojn pri lia naskiĝo kaj maljuniĝo. Kie
ajn mi estis en Svedlando, ĉie mi mire

101 ĝis 200.

Jen la dua cento de aliĝintoj al la Universala Kongreso de Esperanto en Stockholm 1934:

101. James Rodger, ekslernejestro, Rosend Castle, Burntisland, (Fife), Skotlando.
102. Benoit Beau, profesoro, Rue de Lyon 23, Macon, Francujo.
103. Erik Ekström, konstrulaboristo, Vegagatan 10, Göteborg, Svedujo.
104. Lilly Olsson, Snickaregatan 6, Göteborg, Svedujo.
105. William Percy Merrick, Brita Penso, Shepperton, Anglujo.
106. Marie Charlotte Merrick, „ „
107. J. J. Boutwood, Holland house, Laton Road, Hastings, Anglujo.
108. C. H. Satchell, Grove Road 7, London E11, Anglujo.
109. A. B. Edwards, c/o Mrs Spoor, Tenders str 7, Bishop Auckland, Anglujo
110. E. Dovey, Glendale Road 1, Hove, Sussex, Anglujo.
111. H. W. Holmes, Fillebrook Road 38, London E 11, Anglujo.
112. N. Holmes, „ „
113. Thomas Pattinson, Grasmere street 20, Gateshead, Anglujo.
114. Jenny Jensen, kontoristino, Vester-vig, Danujo.
115. Wivi Rönholm, instruistino, Jätten-dal, Svedujo.
116. J. A. Svantesson, fervojisto, Gamlestadsvägen 11—15, Göteborg, Svedujo.
117. W. Ackermann, instalisto, Düsseldorfstrasse 61, Düsseldorf, Germanio.
118. Käthe Ackerman, „ „
119. Evi Landström, Israeli 3—2 a, Tallinn, Estonio.
120. Ernst Andersson, metallaboristo, Holländareplatsen 40, Göteborg, Svedujo.
121. Roger Bernard, Pierre-Joigneaux 26, Bois-Colombes, Francujo.
122. Vera Valberg, Tunagatan 4 B, Upsala, Svedujo.
123. Alison A. Nicol, Kenmure str. 268, Glasgow S 1, Skotlando.
124. Agnes B. Nicol, „ „
125. J. Ravestein Jr., instruisto de Esp., Pomonlaan 55, 's Gravenhage, Nederlando.
126. J. M. Ravestein, „ „
127. Sophia H. W. Kautzmann, oficistino, Stationsweg 12, Ede, Gelderland, Nederlando.
128. J. Reuschenbach, komercisto, Grucner Heideberg 11, Cleve, Germanio.
129. Mary Knudsen, kontoristino, Vester-vig, Danujo.
130. Johanna Eyck, sekretariino, Charlottenbrunnen 47, Berlin-Grunewald, Germanio.
131. Jakob Telling, poŝtoficisto, Bellevoystraat 36, Rotterdam, Nederlando.
132. Riek Lemhuis, instruistino, Markt 13, Doetinchem, Nederlando.
133. Heleen Renken, instruistino, P. Campersingel 169a Groningen, Nederlando.
134. Hans Fox, instruisto, Danzig-Oliva, Danzig.
135. H. Plemper van Balen. Steniaweg 36, Zeist, Nederlando.
136. Frederich Kollé, komercisto, Munzplatz 11, (Eggers) Hamburg, Germanio.
137. Georges Saget, direktoro, Rue St. Jacques 4, Elbouf-sur-Seine, Francujo.
138. Irma Saget, „ „
139. Hilda Hansson, instruistino, Södra Långgatan 28 b, Malmö, Svedujo.
140. Henning Halldor, redaktoro, Vulkanusgatan 9—11, Stockholm, Svedujo.
141. Jean Rouquié, instruisto, Carsac, (Dordogne), Francujo.
142. Adolf Selten, komercisto, Wardein 7, Breslau, Germanio.
143. Käthe Selten, „ „

rigardis la elegantajn, modernajn maljunulejojn. La laponhejmo estas varma, pura, agrabla domo kun malgrandaj, beletaj ĉambroj, kie la laponoj devas dormi en litoj, kaj ne sur la planko. La »lita« dormo estas, kiel la flegistino rakontis al mi — unu el la plej grandaj korpaj kaj animaj provfaroj, ne menciinte la oftan baniĝon, ĉar la nomadaj laponoj ĝis nun eĉ en esceptaj okazoj ne kuntrenadis bankuvojn La nuna aro konsistas el naŭ laponoj, inter ili du blinduloj, kiuj, kompatindaj, dum la tuta tago dormas kaj songadas pri senfinaj neĝokampoj. Maljuna lapon-onklino rapide murmuris sian biografion al la »doktori« — tiu mi estas — bedaŭrinde mi ne komprenas multe, iom tro rapide ŝi parolas kaj krome mi eĉ unu vorton ne scias el la laponlingvo. Sed tio ne tro embarasas ŝin.

(Daŭrigo.)

144. Mevrouw E. M. van der Schuyt, Parkweg 179, Voorburg, Nederlando.
145. Gösta L. Eriksson, Box 600, Tierp, Svedujo.
146. Knut A. Bergfors, instruisto, Skönsberg, Svedujo.
147. Otto E. Lindvall, Vinbergsgatan 10, Lidköping, Svedujo.
148. Benjamin Klajnerman, librotenisto, Cours Léopold 16, Nancy, Francujo.
149. Frantisek Buhr, sekretario, Belohorská 514, Praha XVIII, Ĉeĥoslovakio.
150. Ingrid Danielsson, flegistino, Ulleråkers s:a Sjukhus, Upsala, Svedujo.
151. Michele Arabeno, profesoro, via Crimea 8/24, Genova, Italujo.
152. Paul Nylén, redaktoro, Huddinge, Svedujo.
153. Isabel C. Fortey, eksinstruistino, Birdhurst Road 34, South Croydon, Anglujo.
154. J. R. Grocott, inĝeniero, Lammack Road 89, Blackburn, Anglujo.
155. Nellie Grocott, " " "
156. David Kennedy, instruisto, Craigpark 60, Glasgow, Skotlando.
157. Meg Kennedy, instruistino, " " "
158. J. C. van de Wetering-Meesters, 3e Bramstraat 21, 's Gravenhage, Nederlando.
159. Mies Smith, Lekstraat 166, Amsterdam, Nederlando.
160. Hans Bakker, Nieuwe Keizersoracht 56, Amsterdam C, Nederlando.
161. Neil Smith, korektistino, Lekstraat 166, Amsterdam, Nederlando.
162. Teodor Julin, poŝta notario, Ålstensgatan 110, Ålsten, Svedujo.
163. Eva Julin, " " "
164. Knut Öhrn, kontoristo, Arbrå, Svedujo.
165. H. Bonnevie, kondidato de filologio, Bergsliens gate 11, Oslo, Norvegujo.
166. Giovanni Rotondo fu Michele, Corso Mazzini 75, Bari, Italujo.
167. Charlie Hedkvist, Bredåker, Åkerås, Svedujo.
168. Ragnvald Overvoll, sekretario, pastro, Langesgate 7, Oslø, Norvegio.
169. Hedvig Edvall, instruistino, Alfta, Svedujo.
170. Frida Löfstedt, instruistino, Bjuv, Svedujo.
171. Ilse Haberland, stenotipistino, Friedrich Karlstrasse 13, Berlin O 112, Germanio.
172. H. Risson, profesoro, Mörkenweg 33, Bergedorf, (Hamburg) Germanio.
173. Einar Knutsson, Fil. magistro, Syrengatan 22, Malmö, Svedujo.
174. Paul Tarnow, provinca konsilanto, Düsseldorfstr. 5, Düsseldorf-Oberkassel, Germanio.
175. Inga Kristoffersson, instruistino, Nockebyäven 112, Stockholm, Svedujo.
176. Ledeboer-Kok, Juliana van Stolbergplein 20, s' Gravenhage, Nederlando.
177. C. J. van dam, oficisto, Zaaiersweg 47—B, Amsterdam-Oost, Nederlando.
178. C. M. Hamaker, Ceintuurbaan 7, Hilversum, Nederlando.
179. C. M. Hamaker-van Haeften, Ceintuurbaan 7, Hilversum, Nederlando.
180. Nen Rademaker, poŝtoficistino, Terweepark 8, Leiden, Nederlando.
181. A. H. E. van Vliet, instruistino, van Boetselaerstraat 45, Alphen a. d. Rijn, Nederlando.
182. A. B. Lavén, tapetisto, Linnégatan 5, Hagaby, Örebro, Svedujo.
183. Martin Nilsson, pentristo, Sommaro, Hovsta, Svedujo.
184. Berta Ewert, Karlbergsvägen 89, Stockholm, Svedujo.
185. Margareta Hjort, Rimbo, Svedujo.
186. Alfhild Svedmark, instruistino, Fridhemsgatan 2, Stockholm, Svedujo.
187. Ruth Berglund, instruistino, Box 41, Alby, Svedujo.
188. Anders Brodin, komercisto, Alby, Svedujo.
189. O. H. Andersson, fervojisto, Sörängsvägen 39, Nässjö, Svedujo.
190. G. O. Karlsson, instruisto, Hasselskola, Stehag, Svedujo.
191. Wilhelm Bär, veterinaro, Altenstadt, (Hessen), Germanujo.
192. Else Schütt, Wilhelmstrasse 1, Berlin-Friedenau, Germanujo.
193. Jacob Laansma, profesoro, Heerenlaan 38, Zeist, Nederlando.
194. Ernst Aron, advokato, Steindamm 11/12, Königsberg, Germanujo.
195. Lilly Haraldson-Hagberg, Fredsgatan 3, Nynäshamn, Svedujo.
196. Stellan Engholm, instruisto, Nyberget, Smedjebacken, Svedujo.
197. Olga Engholm, " " "
198. G. D. Buchanan, komercisto, Garth Street 7, Glasgow C 1, Skotlando.
199. Louis Bastien, rue de Vaugirard 116, Paris 6e, Francujo.

200. Endla Koplus, Endla 50—2, Tallinn, Estonio.

Laŭlande: Alĝerio 1, Anglujo 15, Belgujo 5, Ĉeĥoslovakio 3, Danujo 4, Danzig 1, Estonio 14, Finnlando 1, Francujo 13, Germanio 30, Hispanujo 1, Italujo 8, Latvio 1, Nederlando 27, Norvegio 11, Skotlando 7, Svedujo 58 = 200.



Massanslutning av klubbar till S. E. F.

I samband med årsskiftet ha följande klubbar anslutit sig:

Billesholms Esperantoklubb
Eksjö Esperantoförening
Fellingsbro Esperantoklubb
Fjälkinge Esperantoklubb
Genevads Esperantoklubb
Hällekis Esperantogrupp
Jättendals Esperantoklubb
Jönköpings Esperantoklubb
Karlskoga («Aglo») Esperantoklubb
Kumla Esperantogrupp
Lövås Esperantoklubb
Malmö Esperantoförening
Pålsboda Esperantoklubb
Tuna-Hästbergs Esperantoklubb
Ulricehamns Esperantoklubb
Umeå Esperantogrupp
Årsunda Esperantoklubb
Östervåla Esperantoklubb

Vi hälsa var och en av ovanstående klubbar välkommen i förbundet. Medlemsökningen visar en så glädjande stegring att år 1934 med all sannolikhet kommer att bli ett verkligt framgångens år för esperanto. Detta är av vikt för hävdande av självkänsla och visshet om att varje dag som går, närma vi oss esperantos slutliga seger!

Stockholm 1 februari 1934
Svenska Esperanto-Förbundet
Sekretariatet.



Svenska Esperantoförbundets årsmöte 1934 till Södertälje.

På sammanträde med S.E.F.'s styrelse den 6 febr. antogs inbjudan från Södertälje Esperantoförening »Progresado» att hålla Svenska Esperanto-Förbundets årsmöte 1934 i Södertälje under pingshelgen 19—21 maj.

Garantifonden

för 1934 års Universella Esperantokongress i Stockholm har erhållit ytterligare följande stöd:

Sundén-Gullberg, Stockholm ...	200:—
Sam Owen Jansson, Lidingö ...	100:—
Sam Janson, Lidingö	100:—
N. Åkerberg, Stockholm	100:—
Birger M. Ekelin, Stockholm ..	100:—
Helmi Josefson, Stockholm	100:—
H. Afzelius, Lidingö	100:—
Nils Gösta Åkerman, Äppelviken	100:—
Alvesta Esperantoklubb	50:—
Lunds Esperantoklubb	50:—

Vi framföra ett hjärtligt tack för det storartade förtroende, som Sveriges esperantister visat sommarens kongress genom att teckna sig som garantier för angivet belopp. Ehuru vi hoppas och tro, att kongressen kommer att ekonomiskt bära sig, ger garantifonden större trygghet åt förberedelserna.

Betydligt över 10.000:— kr. äro nu tecknade, men fortfarande är det långt kvar till 20,000:— kr.

Stockholm 1 febr. 1934

LKK

Svenska Esperanto-Förbundets julpristävlan

för korrespondenskursens deltagare under år 1933 är nu avgjord. Följande lyckliga få alltså på förbundets bekostnad gratis åka till sommarens stora kongressevenemang i Stockholm och dessutom 50 kr. var kontant:

- 26144 Elly Holldin, Storgatan 15, Strömsbro.
27027 Sven Berg, Vallgatan 34, Karlskrona.
28712 Walter Johansson, Höjen Håle, Sjuberga.

För den händelse någon eller några av dessa skulle få förhinder att använda sig av sitt pris, har för respektive stipendiater utsetts följande ersättare:

- 27761 Gunvor Berglund, Olivedallsgatan 16, Göteborg.
28447 Vega Pettersson, Box 126, Karlsborg.
26437 Abraham Abrahamsson, Sättra, Geijersholm.



Loĝej-prezoj.

Ĉiuj hoteloj, kie ni havigis ĉambrojn por la kongresanoj, estas kontrolitaj de reprezentanto de LKK. Ni konstatis, ke ĉie regas ordo kaj pureco, kaj ke la diferenco inter la hoteloj estas nur komforteco kaj moderneco.

Por ricevi favorajn kondiĉojn LKK interkonsentis kun la hoteloj, ke la kongresanoj devas mendi loĝejon por la tuta kongrestempo (de 4-a aŭgusto tagmeze ĝis 11-a aŭgusto posttagmeze), do por entute 7 tagnoktoj. Se iu deziras por pli mallonga tempo, ni devos kalkuli je iom pli altaj prezoj.

La ĉi subaj prezoj enhavas pagon por 7-tagnokta loĝo kaj por ĉiuj trinkmono. La tuta restado dum la kongresa tempo koncerne loĝon estas kovrita per enpago de decidita mono. Sed neniu manĝo estas enkalkulita. (Matenmanĝo kostas en la hoteloj 1—1:25 sved. kr.)

Loĝo dum 7 tagoj:

- A. Lukshoteloj: 70:— sved. kr.
- B. Grandaj hoteloj, kie al ĉiu ĉambro apartenas aparta banĉambro aŭ duĉambro kun fluanta varma kaj malvarma akvo: B. 1. ĉambro unulita 49:— sved. kr. B. 2. ĉambro dulita 91:— sved. kr.
- C. Malgrandaj hoteloj, kie en ĉiu ĉambro estas fluanta varma kaj malvarma akvo: C. 1. ĉambro unulita 42:— sved. kr. C. 2. ĉambro dulita 84:— sved. kr.
- D. Malgrandaj hoteloj, sen fluanta akvo: D. 1. ĉambro unulita 35:— sved. kr. D. 2. ĉambro dulita 70:— sved. kr. D. 3. ĉambro trilita 84:— sved. kr. D. 4. ĉambro kvarlita 112:— sved. kr.

- E. »Hejmo por virinoj». Ĉambroj kvarlitaj. Malgranda nombro. Prezo popersone 17,50 sved. kr.
- F. Loĝo en diversaj ŝtataj aŭ privataj societoj. Ĉambroj 4- ĝis 6-litaj. Limigita nombro. Prezo popersone 17,50 sved. kr.
- G. Loĝo en kazerno. Prezo popersone 11:20 sved. kr.
- H. Loĝo en privataj familioj. Prezo popersone 21:— sved. kr.

Frua mendo estas rekomendinda, ĉar ni provos havigi la plej bonajn ĉambrojn al la mendontoj. Per frua mendo vi ankaŭ faciligos nian laboron.

Allogajn postkongresajn vojaĝojn aranĝos Esperanta Turista Komisiono. La Universala Kongreso finiĝos 11 aŭg. Jen la ekskursaj eblecoj:

- A. 11—18 aŭg. al Laponio (Kiruna, Abisko, Porjus, Narvik), 1500-kilometra vojaĝo norden de Stokholmo, manĝo, loĝo, gvidado, trinkmono. Prezo proks. 150 sved. kr. Limigita nombro.
- B. 11—15 aŭg. al Jemtland (Åre, Trondheim), 900-km nordokcidenten de Stokholmo, vojaĝo, manĝo, loĝo, gvidado, trinkmono. Prezo proks. 80 sved. kr.
- C. 11—15 aŭg. al la insulo Gotland (Visby), vojaĝoj, manĝo, loĝo, gvidado, trinkmono, en la plej malkara klaso 35 sved. kr.

Antaŭkongresoj.

- a. Malmö (Svedujo).
- b. Gotenburgo (Svedujo).
- c. Oslo (Norvegujo).

Postkongresoj.

- a. Tallinn (Estonio).
- b. Helsinki (Finlando).

Ĉiu kongresano ricevos informojn kaj aliĝilojn al la koncernaj kongresoj.

LOKA KONGRESA KOMITATO.



Kongressanmälan

bör insändas med det allra snaraste av varje svensk esperantist.

Kom ihåg

att den lägre kongressavgiften gäller endast till den 1 april. Endast 10 kr. behövs insändas såsom första inbetalning.

SVEDA KRONIKO

BOLLEBYGD. La 29.10. ges-oj Seppik prelegis antaŭ pli ol 200 homoj pri sia hejmlando, montris belajn lumbildojn kaj ludis estonajn popolajn kantojn per gramofono. Interpretis sano Magnelsson el Göteborg.

BORAS. Jus komencis kurso kun red. T. Morariu kiel gvidanto.

— En Novembro pasintjare la Esperantoklubo aranĝis esperantokurson kun s-ino Seppik kiel instruistino. Tiu kurso finiĝis la 24.1. kaj 27.1. Okazis finfesto en la popollernejo. Krom la 85 gekursanoj ĉeestis pli ol 100 personoj. Je la soleno parolis s-ro A. Norén, superinstruisto H. Svensson kaj redaktoro C. H. Johansson, kaj poste sekvis vigla forte aplaŭdita »finkonversacio» inter la kursgvidantino kaj ŝiaj gelernantoj, disdono de diplomoj, dankparoloj ktp. Kelkaj gekursanoj prezentis modele gajan komedieton. Plue la reprezentanto de la Sveda



La »Seppik-ina» kurso en Falköping. En la dua vico s-ino Seppik, maldekstre de ŝi s-ro E. Malmgren (kun okulvitroj), la sekr. de S.E.F.

ESKILSTUNA. Vizito dum 2 semajnoj de s-ro Syské Stuit el Holando. Li faris lumbildajn paroladojn pri sia hejmlando, kaj pri Esperanto. Vizito ankaŭ ĉe Forshälla, Kvicksund kaj Skogstorp. Entute li havis bonan sukceson. En nia lasta kunveno li parolis pri siaj interesaj vojaĝoj piede tra kelkaj landoj. Li ankaŭ faris provlecionon kaj ni esperas novan kurson por komencantoj, ĉar multaj interesiĝis. *Sekr.*

FALKÖPING. La 20.11. lumbildparolado de s-ino Erika Seppik antaŭ 150 homoj. Tradukis s-ano Norén. La 30.12 kristnaska festo por la kursanoj kaj klubanoj. Kelkaj kursanoj prezentis du interesajn teatraĵojn, deklamis kaj kantis. Lektoro Seppik estis bonega kristnaska koboldo kaj disdonis al la ĉeestantoj — pli ol 100 gesanoj — multe da donacoj.

Esperanto Instituto, s-ro E. Malmgren, Stockholm, parolis pri la graveco de Esperanto, kaj ankaŭ lektoro Seppik faris paroladeton. La festo, kiu vekis grandan intereson kaj estis tre sukcesa, finiĝis per kanto. Poste la klubo aranĝis festan kunestadon en la bontemplana ejo »Fälbygden», vizitita de multaj esperantistoj el la tuta distrikto. Dum la vespero parolis s-ro E. Falk, Skövde, oni trinkis kafon, dancis ktp kaj de la gekursanoj estis transdonita memordonaco al la ŝatata s-ino Seppik. — La tiel finita kurso estis tre sukcesplena kaj donis tre bonan rezultaton. La 28.1. ekzameniĝis 20 de la gekursanoj.

HALLSBERG. 29.12. la grupo havis kiel finiĝo de la komenca kurso esperantan festenon en Granda Hotelo de Hallsberg. Ĉeestis red. T. Morariu, kiu dum la aŭtuno tie ĉi gvidis kursojn. E. Värn fa-

ris paroladeton, kaj en la nomo de la kursintoj li transdonis al red. Morariu monsumeton kiel dankesprimon, pro lia laboro. Red. Morariu dankis per paroladeto humora. Sekvis muziko, deklamado kaj danzado. — 6.1. la grupo jarkunvenis. Kiel estraron oni elektis: s-ron Fritzell, prez.; E. Brandt, sekr.; E. Värn, kasisto. La novelektita prez. per paroladeto dankis al la eksprezidanto J. W. Gustafsson pro farita bonega laboro. De 1 jan. la klubo nomiĝas Hallsberga Esperantouniĝo. Post la kunvenaj aferoj oni altabligris ĉirkaŭ la bonege preparita festotablo. — 17.1. la unuiĝo decidis ke la esperantokurso daŭrigos kiel studrondo. 18 personoj anoncis sin, gvidos B. Elander. *E. J.*

HÖGANÄS. En la komenco de la antaŭa jaro okazis kvar studrondoj, unu komenca, unu daŭriga, unu konversacia kaj unu infana. Post la novjaro komencis ankoraŭ unu komenca. Post la fino de la studlaboro estis fondata en la klubo infana sekcio. Ĉiujn okazas samtiel. Ŝajne la infana laboro donos bonan frukton, kio dependas de la bona gvidantino Conny Banch.

JÖNKÖPING. 9.1. Jarkunvenis la klubo ĉi tie. Estraro por la nova jaro estas: Folke Hagvall, prez.; Bror Svensson, v. prez.; Knut Jensie, sekr.; Hj. Nestor, v. sekr.; And. Sandberg, kas.; G. Svensson kaj David Ekfeldt.

La klubo estas tute neŭtrala, kaj ĉe la jarfino 12 membroj de la klubo apartenas al SEF kaj UEA kaj 7 al SLEA. Ĉiuj pere de la klubo estas aligitaj al la menciitaj asocioj kolektive. Okazis inter alie je la jarkunveno »Viva Gazeto», prelego, deklamado, kantado ktp. La klubo ankaŭ decidis sendi proteston al A.-B. Radiotjänst pro la decido ne doni al la granda esperantistaro sveda sufiĉe da tempo por Esperanto en radio.

La sekr.

— La 28-an de jan. gesinjoroj Seppik ree ĝojigis la Jönköpinganojn per vizito. La prelego, pri Estonio, la lando de tre multaj memoroj, estis enkadrita en ĥora kantado, kaftrinkado, deklamo, muziko ktp. Ĉeestis proksimume 100 geinteresuloj. *La aparato.*

KARLSKOGA. 1.1. Ĉi tiea esperantoklubo »La Aglo» jarkunvenis. Ni decidis aliĝi al SEF. Kiel estraro estis elektataj: Prez. Ragnar Lindahl; vicprez. Sune Ahlin; sekr. Edvin Storm; vicprez. Gustav

Sandvall; kas. Gusten Nyström. La klubo havas nun 21 membrojn. Kvar studrondoj por komencantoj laboras vigle, gvidataj de R. Lindahl, S. W. Ahlin, Gust. Sandvall kaj E. Storm. Partoprenas ĉ. 45 pers. »La Aglo» kunvenas ĉiun duan vendredon monate en Conditori »Solbringen». — 26.1. »La Aglo» kunvenis en Conditori »Solbringen». La prez. legis Esperantan kronikon, Nyström deklamis kaj Ahlin klarigis al ni problemojn en la lingvo, dum la lingva kvaronhoro. Samideano Elg el Grums rakontis pri siaj travivaĵoj en Esperantujo. Entute tre agrabla kunveno. *Ulmo.*

KUMLA. 15.12. Okazis kursfiniĝa festeno por la partoprenintoj en la kurso de Morariu. S-ano Morariu ricevis monsumon kiel memorajon. Dum la festeno okazis dialogoj kaj teatraĵo. Sekvis kaftrinkado kaj poste danco ĝis meznokto. — 15.1. Kumla Esperanto-Asocio »La Estonto» jarkunvenis. Oni elektis la jenan estraron por 1934: Prez. Bengt Söderlund, kas. Tage Broström; ceteraj: Olga Blomstrand, Tage Goldheim, Fritz Ström. — 18.1. komenciĝis daŭriga kurso por la partoprenintoj en la Morariu-kurso. Partoprenas ĉ. 30, kaj gvidas Goldheim kaj Ström. *Torento.*

KVICKSUND. Esperanto-Klubo de Kvicksund 6.1. jarkunvenis. La jarraporto montras ke la pasinta jaro estis bona. Oni faris jenajn elektojn: Sture Carlsson, prez.; Rune Larsson, vicprez.; Holger Ekblad, sekr.; Folke Andersson, vicsekr.; Olle Johansson, kas. Peranto por Eldona S. E. Holger Ekblad. — 11.1. Prelegis Ĉeinstruisto s-ro Sipké Stuit, Holando, en Rekarne. Ĉeestis pli ol 100 personoj. Tradukis Ekblad. Post la prelego okazis tre bona provleciono en Esperanto. — 22.1. Komencis kurso por komencantoj en Rekarne. Sin anoncis 14 personoj. — 24.1. Komencis daŭriga kurso en Rekarne. La kursojn gvidas Holger Ekblad. *Kverkfolio.*

KVÄNUM. La esperantokurso en Kvännum, kiun gvidis lektoro H. Seppik, finiĝis 21.1. je solena, publika festo. La finfeston partoprenis multaj personoj el la loko kaj gesamideanoj el Falköping kaj Skara. Entute ĉeestis ĉirkaŭ 100 personoj. Lektoro Seppik faris »ripetadan konversacion» kun la 28 kursanoj, s-ino Seppik kaj redaktoro C. H. Johanson, Falköping, parolis kaj la kursanoj kune kun kelkaj Falköping-anoj ludis tri

teatraĵojn. Poste sekvis festeno en pensiono Manders kun kantado, muziko, kaftrinkado k.t.p. kaj kursano transdonis memordonacon de la Kvänüm-kursanoj al gesinjoroj Seppik.

LIDKÖPING. 16.12. 1933 finiĝis la kursoj de A.B.F., gviditaj de Dr. Fr. Szilágyi. La finfesto okazis en Hotell Svea, kie estis kunvenintaj la multaj gekursanoj kun amikoj. La klubprez. bonven-salutis la ĉeestantojn kaj post la kaftrinkado kurskomitatano kun kelkaj dankvortoj de la partoprenintoj al la ŝatata instruisto transdonis donacon kiel memorajon pri la neniam forgesbla tempo, kiam dr. Szilágyi, kune kun la film-

LUND. 13.1. En Akademiska Föreningen tre bone aranĝita »Knutfesto» kun muziko, kanto, kafo, tablokantoj, laŭlegado skanie, vendado de belaj ĉapeloj kaj — al la sinjoroj — koroj kun duone skribita verso; poste elserĉado de la fraŭlino, kiu posedas la mankantan duonon, kaj poste dancado ĝis lacego. La ĉ. 200 ĉeestantoj kontentaj, la kasisto feliĉa kaj la proponinto de la festo: »Knut-filo», fiera. — 23.1. Kunveno kun viva gazeto, tagaj novaĵoj kaj prelego de s-ro O. N. Ihrborn pri »Ekskurseto en la historio de la mondlingvoj». — La esperantaj kursoj ree komencis. *El Lo.*



Ĉe la finiĝo en Lidköping: En la unua vico s-ino Seppik (nacie vestita), d-ro Szilágyi kun edzino kaj lektoro Seppik.

aktoro Adamsson al ili instruis Esperanton. Sekvis paroladetoj de du komencantoj, kiuj per tio montris ne nur kiom ili lernis, sed ankaŭ kiel bone kaj lerte dr. Szilágyi al ili instruis. Post bonkora parolado de dr. Szilágyi, dum kiu li esprimis sian dankon kaj esperis ke ĉiu daŭrigos la studadon, sekvis deklamado de klubanino kaj paroladoj de niaj gastoj ges-oj Seppik. Poste sekvis la dancado, rompita de kelkaj paŭzoj, dum kiuj oni kaj kantis komune kaj aŭskultis solokantojn de kamarado N. Ahlberg. Kun kvarfoja vivu-o por Esperanto finiĝis la vere gaja vespero.

25.1.1934 komenciĝis daŭriga kurso por la partoprenintoj de la kursoj de dr. Szilágyi. La kurson gvidas kamarado Erik Ahl. *T.*

MALMÖ. Klubo Esperantista de Malmö okazigis kristnaskfeston 29.12 en la festsalono de Druidorden. Ĉirkaŭ 160 pers. ĉeestis kaj ĝuis de tre varia programo, konsistanta el muziko, kanto, deklamo, dialogo. La festo finiĝis per danco ĝis meznokto. — 24.1. okazis la jar-kunsido. La estrado por 1934 aspektas jene: Prez. Erik Andersson; v. prez. Hj. Andersson; sekr. Ester Andrén; v. sekr. Helge Andrén; kas. Gösta Henriksson; bibl. Wilh. Johansson; klubmajstro Börje Persson. La klubo, kiu iniciatis antaŭkongreson en Malmö, elektis ankaŭ 10 personan kongreskomitaton, kiu kune kun komitatanoj de la aliaj kluboj preparas la antaŭkongreson. La klubo estas depost novjaro kolektive aliĝinta al SEF kaj UEA. *Partopreninto.*

Tre korajn salutojn..... s i r i

MUNKEDAL. Ĉi tiea klubo »Ĉiam Antaŭen» jarkunvenis 21.1. en la popola domo. Estraro por 1934 fariĝis: prez. Knut Schewenius; vicprez. Franz Tholén; sekr. Elin Zachrisson; vicsekr. Fredric Smith; kas. Einar Zachrisson; klubmajstro Ivan Dahlkvist. La aliĝo al UEA pritraktiĝis. La estraro ricevis komision aranĝi esperantan bibliotekon. Kiel raportisto al La Espero elektiĝis

Z-filo.

NYBRO. Nybro Esperantoklubo jarkunvenis 14.1. La klubanoj laboris diligente kaj kuniĝas ĉiun semajnon. La klubkamaradoj, kiuj loĝas ĉ. 15 kilometrojn malproksime de Nybro en vilaĝo nomata Flygsfors, laboras en propra rondo. La estraron oni reelektis kaj ĝi konsistas el jenaj:



La Esperantorondo en Nybro.

K. F. Lindqvist, prez.; A. Franzén, Flygsfors, v. prez.; Tage Borgström, v. sekr.; Rutger Gustafsson, kas. Repr. por Förlagsföreningen Esperanto estas K. F. Lindqvist. Al »La Verdaj Rokoj» oni subvenciis 5 kronojn por unua jaro. Laste la klubo decidis forte agati por la radiokurso spite de la ridinde almezurita tempo. — La 10-an de nuna februaro la klubo aranĝos propagandofeston, kun instruisto Fritiof Ahnfeldt, Torskors, kiel parolanto.

La Raportanto.

SKARA. Skara Esperantoklubb hade årsmöte 21.1. Till styrelse för 1934 valdes ordf. G. Hedert; v. ordf. E. Bogren; sekr. E. Strandh; v. sekr. E. Staberg och kasör R. Boström. Klubben räknar nu ett 30-tal medlemmar. Årsmötet var på samma gång en avslutning av den av lektor Seppik ledda esperantokursen, som pågått sedan i nov. Till lektor Seppik överlämnades en liten minnesgåva och en kursdeltagare frambar elevernas tack. Klubben beslöt till hedersledamöter kal-

la red. G. Torgny i Skara samt hr och fru Seppik.

STOCKHOLM. Grupo Esperantista de Stockholm havis siajn ordinarajn semajnajn kunvenojn en la kunvenejo Wallingatan 3, 4 tr.: 10.1. Aperis nova numero de la »Viva Gazeto», kiu enhavis paroladetojn, deklamadon, laŭtleĝadon kaj kantadon. — 17.1. Parolis s-ino Julin pri »La novaj planoj por aliigo de malsupra Norrmalm en Stockholm». La interesa paroladon ilustris instruaj lumbildoj. — 24.1. Okazis la jarkunveno. La estraro, kiu nuntempe konsistas el 7 personoj, ricevis la jenan konsiston por 1934: s-ro Nils Hedgren, prez.; s-ro Teodor Julin, vicprez.; s-ro Verner Hägglund, dua vicprez.; s-ro Sigvard Håkansson, sekr.; s-ro Martin Erikson, vicsekr.; s-ro Helge Nordkvist, kas.; kaj f-ino E. Palmblad, vickas. F-inoj S. Linnander kaj N. Törnberg estis elektataj al la revisoraj postenoj. — La grupo havis dum la jaro 52 ordinarajn kunvenojn kaj je la jarfino ĝi konsistis el 135 pagintaj membroj. 10 kursoj okazis dum la jaro, 4 printempe kaj 6 aŭtune. Pro la ĝenerala aliĝo al UEA la jarkunveno altigis la jarkotizon ĝis 6 kronoj. Post la pritraktadoj de grupaj aferoj ĉiuj kolektiĝis ĉirkaŭ la tabloj por manĝi kaj trinki ĝis la teatra grupo aperis sur la scenejo kaj prezentis la teatraĵon »La mistera seĝo», farso en du aktoj de Sigvard Håkansson. — 31.1. Aperis tre vigla kaj gaja numero de la »Viva Gazeto». Krom tio estis prezentata malgranda skeĉo: »La murdo». Sekr.

La 15-an de januaro Grupo Esperantista de Stockholm aranĝis grandan propagandan vesperon en Auditorium. La kunveno estis la komenco de la printempaj kursoj, kiuj tuj poste komenciĝis kun d-ro Szilágyi kiel instruisto.

La kunveno, kiu estis vizitata de pli ol mil personoj, fariĝis granda sukceso kaj oni aliĝis multnombre al la novaj kursoj.

Rektoro Jansson malfermis la kunvenon per kelkaj vortoj pri la utilo de Esperanto kaj poste prezentis la ĉefparolanton, profesoron Collinder, al la publiko. Tiu tre klare kaj interese parolis pri Esperanto el scienca vidpunkto. Per lertaj vortoj li kontraŭbatalis kaj tute neniigis eventualajn erarajn antaŭjuĝojn, kiujn oni povas havi kontraŭ Esperanto.

Post tio d-ro Szilágyi demonstriis sian faman lumbildan instrumetodon kaj en sia amuza kaj simpatia maniero donis al

la ĉeestantoj mallongan esperanto-lecionon.

S-ro Sinha el Hindujo, kiu ankaŭ parolis, menciis pri la grandaj malfacilaĵoj, kiuj kolektiĝis ĉirkaŭ li, kiam li unuan fojon venis al Svedlando kaj ankoraŭ ne scipovis Esperanton. Post ellernado de nia lingvo li tamen ĉie trovis amikojn kaj Svedlando fariĝis lia dua patrolando.

En mallonga paŭzo inter la paroladoj la esperanta kantĥoro »La Kantobirdaro» bonege prezentis kelkajn kantojn.

Oni vere povas diri, ke la vespero estis tre sukcesplena kaj nun restas nur esperi, ke la ĵus komencitaj kursoj kaŭze de la propaganda vespero, fariĝos same sukcesplenaj kaj donos tian rikolton, kian ili jam promesis. *S. H-son.*

— Esperantokurson inter la stokholmaj skoltoj gvidas d-ro Szilágyi.

SURTE. La 19.11. kursfino de Erika Seppik, ankaŭ por la kurso en la najbara Agnesberg. Solena »publika ekzameno» en la loka kino-teatro kune kun prelego pri Estonio. Vespere festo, kie partoprenis ankaŭ multaj gastoj el Göteborg. La kursanoj prezentis la teatraĵon »Hispana etiketo» kaj transdonis belajn donacojn al sia instuistino, kiu faris tre belan adiaŭan paroladon. Fondita klubo kun nomo »Sepino» (Sepik-ino), je la honoro de la instruistino. Daŭriga kurso de s-ano Svantesson el Göteborg kun 28 partoprenantoj.

SÖDERTÄLJE. Societo Esperantista de Södertälje »Progresado» jarkunvenis 14.1. Kiel estraro estis elektata: E. Grahn, prez.; F. Nyberg, sekr.; N. Coldring, kas.; E. Karlsson, vicprez.; Ragnhild Ahl, vicsekr. Delegito de UEA E. Grahn; vicdelegito Nils Colding. La monatkunvenoj okazos ĉiun 1-an dimanĉon en Folkets Hus je la 2-a posttagmeze kaj ĉiumerkrede je la 7a vespere konversacia kunveno en »Sans Souci». Kunvenprogramoj laŭ la normalplano. *Abio.*

TIERP. 12.12. la klubo festis la »tagon de libroj» kaj dum la kunveno prezidanto Gösta Eriksson paroladis pri Zamenhof kaj lia vivo kaj ankaŭ pri la esperanta stato en la mondo. La blinda klubano Gösta Bryngelsson paroladis pri Esperanto inter la blinduloj. Plue estis kanto, muziko, tradukado ktp. — 23.1. La Esperanto Societo havis sian jarkunvenon. Kiel estraron por la jaro 1934 oni reelektis: Gösta Eriksson, prez.; Knut Eriksson, sekr.; K. G. Eriksson, kasisto. Kur-

soj nun okazas, unu por komencantoj kaj unu por progresemluloj, 22 anoj kune.

ULRICEHAMN. 31.12. okazis la Kristnaskofesteno de la klubo. Interesa programo, i. a. kvar klubanoj kun sukceso prezentis teatraĵon. La klubga gazeto aperis je la unua fojo kaj la ĉeestantoj salutis tiun novan idon inter la esperantogazetoj kun entuziasmo. Plue estis laŭtlegetaj kelkaj telegramoj (fabrikitaj de klubano) de diversaj granduloj politikaj kaj esperantistaj. Post la manĝado de riza kaĉo kaj trinkado de kafo, venis je granda surprizo »sinjoro koboldo» kun la kristnaskaj donacoj vendotaj. Marde la 9-an de jan. okazis la jarkunveno, kaj tiam la klubo decidis aliĝi al SEF. *-ero.*

UPSALA. 5.1. Esperanto societo de Upsala havis tre ĝojan kristnaskfestenon kun »stellknaboj», kiuj kantis la ordinaraĵn kristnaskkantojn. Post tio serviĝis kaĉo kaj kafo. S-ro Ernst Brink deklamis »La koboldon» de Viktor Rydberg. Du koboldoj disdonis kristnaskdonacojn. Poste danco. Ĉirkaŭ 50 personoj ĉeestis. — 19.1. La societo havis jarkunvenon. Estraro por 1934 estas jene: Prez. Gösta Norling; vicprez. Gunnar Svensson; sekr. Eric Pettersson; vicsekr. f-ino Stina Sjöberg; kas. Maur. Andersson. *Sekr.*

VALDEMARSVIK. Nia klubo aranĝis en la fino de decembro Esperanto-eksponon. Poste ni tre multe propagandis por nia lingvo. 15.1. komencis nova kurso laŭ Seppik-Malmgrens Systematisk kurs i Esperanto. 23 personoj aliĝis. Je la dua kursvespero la partoprenantaro plialtiĝis ĝis 37. Gvidas la kurson Alvar Carlsson. — 22.1. la klubo jarkunvenis. Estraro por la nova jaro estas: prez. Alvar Carlson; v. prez. kaj studgvidanto Runo Larsson; sekr. Bertil Svensson; v. sekr. Gösta Levander; kas. Gustav Carlsson. Poste la klubo festis sian unuan datrevenon. Bonan muzikon, komunan kantadon kaj paroleton. Alvar Carlsson prelegis esperante pri la temo: »Tra la belaj landoj de la mondo» kaj montris multajn belajn lumbildojn. Lin tre lerte interpretis Kuno Larsson.

La Fremdulo.

JÄMJÖ. Jämjö Esperantoförening har hållit årsmöte. Styrelse för 1934 är: Ordf. Rudolf Österlind; v. ordf. Carl Johansson; sekr. Signe Nilsson; kas. Emma Olsson; bibl. Emil Johansson; distriktsombud Rud. Österlind, Carl Johansson

Om en svensk teaterturné för 25 år sedan.

Enligt dagspressen skall i samband med världsesperantokongressen i sommar en svensk skådespelartrupp under ledning av regissör Sandro Malmquist ut på turné med någon pjäs i esperantoöversättning. Rutten skulle gå över en hel del bland Mellaneuropas städer. för att återkomma till Stockholm till kongressen. Nu är ju inte hela saken så avgjord ännu, att något bestämt kan sägas, men i samband med detta kan det ha sitt intresse att ta del av vad som tidigare, närmare bestämt för 25 år sedan, hänt i ungefär samma riktning. Det var en av den svenska scenens nuvarande främsta krafter, Ivan Hedqvist, som då stod för något liknandet det, som nu tycks betraktas närmast som en liten sensation.

Herr Hedqvist berättar för Dag. Nyh.:

— Tänk att det redan är tjugofem år sedan. Jag minns det eljest som om det skett i går. Vi voro några Strindbergsbitna teaterungdomar som pluggade esperanto en sommar sedan vi kommit på idén att spela »Paria» och »Fröken Julie» för esperantokongressen i Dresden. D:r Krikortz hjälpte oss med översättningen (Red. Nylén gjorde också en hel del. Red.) och Strindberg, som själv var mycket intresserad för uppslaget, bistod oss med råd och råd. I »Paria» medverkade den numera bortgångne Hjalmar Lauritz och jag, i »Fröken Julie» spelade jag Jean, medan Docky Rydell gjorde Julie och Gull Herrlin Kristin. Om jag får säga det själv, hade vi en betydande framgång i Dresden. Det var också som om esperanto gav en alldeles särskild rytm åt de Strindbergska replikerna i takt med diktarens egen puls.

och Signe Nilsson; ombud för Förlagsfören. Esperanto Rud. Österlind; ombud för UEA Rudolf Österlind. Redogörelsen för det gångna arbetsåret vittnar om en stabilisering. Sakta men säkert har studieverksamheten utvidgats. Tre studiecirklar äro i arbete. Under året har hållits gemensamma samkväm med cirkularna, och nu fattades beslut om en offentlig aftonunderhållning under vårterminen. Återstoden av aftonen användes bl. a. till samtals- och översättningsövningar ur Einar Dahls »Dialogoj».

Vizitu Norvegujon:

Antaŭkongreso en Oslo la 2-an kaj 3-an de Aŭgusto 1934.

Niaj fervoraj samideanoj en Norvegio decidis aranĝi antaŭkongreson en Oslo. Ke Oslo vere estas vizitinda, tion almenaŭ ni svedoj scias kaj ni deziras ke ni havu sufiĉan lokon por povi en nia gazeto doni ampleksan priskribon pri la bela Oslo kun ĝia ankoraŭ pli bela ĉirkaŭaĵo, sed bedaŭrinde tio ne estas ebla. Ni tamen ĉi tie enpresas la programon de la tagoj. Jen!

Gesamideanoj, vizitu la belan norvegan ĉefurbon kaj ĝiajn belegajn ĉirkaŭaĵojn, la fjordojn kaj montojn!

Programo por la antaŭkongreso:

Ĵaŭde la 2-an de Aŭg. Alveno plej malfrue je la 13.00a. Je la 15.00a Rondveturado en Oslo kaj ĉirkaŭaĵoj inkluzive orienta kaj okcidenta urbopartoj, Holmenkollen, Frognerseteren, Kragstenen (kun belega elrigardo) kaj la vila-antaŭurboj al Norsk Folkemuseum (Norvega Popolkultura Muzeo). 16,30a Vizito en la Popolkultura Muzeo kaj en la domo de la vikingaj ŝipoj. 17,30a Reiro al Oslo per ŝipeto kaj tramo. 18,00a Alveno en la Centro de Oslo. 20,00a Komuna manĝado en la hotelo de K.N.A. (Reĝa Norvega Aŭtomobilklubo), kabareto kaj dancado ĝis la 2.00a.

Vendrede la 3-an de Aŭg. Je la 9,30a Vizito en la salono de la fama pentristo Munch en la Nacia Galerio. 11,00a—14,30a Ŝipekskurso inter la insuletoj kaj rokoj en la bela okcidenta parto de la fjordo. 15,00a Lunĉo en restoracio Skansen. Posttagmezo je libera dispono. 19.00a Forveturo al Stokholmo de la orienta stacidomo.

Ĉi ĉio kostas nur 18:— norvegajn kronojn! En tio ne estas enkalkulita la hotelo kaj la ne menciitaj manĝoj.

DO, ALVENU MULTNOMBRE!

KORAN BONVENON!

Carl Stöp-Bowitz

Gazetara ĉefo de Norvega Esperantista Ligo kaj de la antaŭkongresa komitato. Adreso: Gjetemyrsveien 11, Oslo, Norvegujo.

Varje medlem av S. E. F. erhåller 50% rabatt vid köp av Svenska Esperanto-Förbundets värdefulla handböcker. Serien fortsätter.

De ĉie - pri ĉio - al ĉiu.

Hodiaŭ mi komencu per iom da literaturo:

El la decembra numero de *LITERATURA MONDO* ni citas la jenan miniaturon de Edit Södergren, tradukitan de Magda Carlsson: »Floron vi serĉis, — trovis frukton, — fonton vi serĉis — trovis maron, — virinon vi serĉis — trovis animon — malkontenta vi estas» El la sama numero: Pastro Ŝirjaev, la inicianto de la aperonta Esp. Enciklopedio, mortis.

ESPERANTO: (1934, januaro) En la fino de la pasinta jaro ekzistis 2147 lokoj, kie agadis UEA-delegitoj.

HEROLDO DE ESP. Jan. 14.: Internacia konferenco okazos en Vieno 20—24 Majo 1934 sub la devizo: *Esperanto en la lernejon kaj la praktikon*. Ĝi okazos sub la protekto de la Konfederacia Prezidanto de Aŭstrio La ministerio por Komercio kaj Trafiko disponigis la necesan monon por la preparaj laboroj. La Viena Radio ĉiumerkrede proksimume je la 21a—22a h. donas Esp. programon kaj dume ankaŭ aktualajn sciigojn pri la supremenciita grava konferenco.

En la »*ESPERANTA GAZETO*» (28.12.1933) mi trovis interesan statistikon pri la rilato de la motorveturiloj kaj la loĝantaro de la diversaj landoj. Laŭ tio en Usono ĉiu kvina persono havas motorveturilon, Svedlando estas la oka en la listo, post 42 personoj oni povas kalkuli 1 motorveturilon, la lasta estas Ĉinujo, kie el 16000 homoj nur unu havas motoron.

AUSTRIA ESPERANTISTO: (Jan.) Por rememorigi al la leganto ni citas la adreson de la Int. Esp. Muzeo en Wien: I. Neue Burg, Heldenplatz. (Dumvivaj membroj: sv. frcs 12.50, pagebla en tri detaloj.) Muzea materialo volonte akceptata.

POLA ESPERANTISTO: La Pola Touring Klubo en sia oficiala organo aperigas sciigojn kaj informojn pri la Esp. movado.

ESP. LERNANTO (Japanujo) jan. 1934: La kovrilo havas vere belegan bildon de la sveda parlamento, kie okazos la nunjara kongreso. Plie ĝi enhavas portreton de kaj tekston pri nia red. P. Nylén kaj ankaŭ la novelon »La sukero» de Selma Lagerlöf, trad. B. Gerdman, Stockholm.

THE BRITISH ESPERANTIST: (Jan.) En Southend-on-Sea proksimume 30 el la lokaj geinstruistoj estas Esperantistoj. (Antaŭ ok jaroj estis entute 12 Esp-istoj en la urbo. Estas interese noti kelke da vortoj pri tiu forta loka movado. La loka grupo estas estrata de 14-membra kosilantaro, kiu kunsidas regule ĉiumonate. Specialaj fakoj: sociaj aferoj, instruado, organizo, muziko ktp. Ĉefkunvenoj ĉiumonate kun programo ankaŭ al neesp-istoj, krome ĉiusemajna kunveno. Eksterlanda instruisto, kontakto kun la eksterlando. Alta kotizo, por garantii la financon bazon de la societo. »Ni absolute ne permesas, ke ia politika tendenco regu en la societo.»

BULTENO DE ĈEĤOSL. AS. ESP.: (31.12.1933) Stacidomaj tabuloj kun Esp. teksto troviĝas en 45 ĉeĥoslovakaj stacioj.

Fersil.

Skaraborgs läns Esperantodistrikto.

havis sian jarkunvenon en Falköping 28.1. La kunvenon, en kiu partoprenis ĉirkaŭ 40 reprezentantoj el 6 kluboj, gvidis la distrikta prezidanto E. Ahl, Linköping. Laŭ la raportoj Esperanto bone progresas en Skaraborg. En Lidköping dro Szilágyi, en Skara kaj Kvänum lektoro H. Seppik kaj en Falköping s-ino Seppik gvidis sukcesplenajn kursojn. Krome laboras kelkaj studrondoj. La membraro de la distrikto estas nun 150 en 6 kluboj. Kiel distrikton estraron oni elektis Ivan Kjellström, Karlsborg, prez. kaj s-roj Emil Falk, Skövde, H. Carlbom, Lidköping, Nord, Tidaholm kaj E. Staberg, Skara. La Karlsborga klubo elektos sekretarion kaj kasiston. La someran kunvenon aranĝos la Karlsborg-anoj. Dum la kunsido parolis lektoro H. Seppik, s-ino Seppik kaj s-ro E. Malmgren, Stockholm. S-ro Seppik atentigis pri la graveco de distrikta organizo kaj pri la grandaj labortaskoj de distrikta estraro. S-ro Malmgren klarigis en forte aplaudita parolo la »Radio-servan» aferon kaj priparolis krome la Stokholman kongreson. Fine parolis s-ro E. Falk, dankante la kunhelpantojn kaj la gastigintan klubon, oni hurais por Esperanto kaj kantis kune kanton.

Negoco per Esperanto inter Novzelando kaj Svedlando.

Novzelando, la lando situanta 200 km. sude de Aŭstralujo kaj unu el la plej proksima, loĝata lando de la suda poluso, estas tre malfacile kulturebla rilate al nia lingvo. La nombro de la Esperantistaro tie ne estas tre granda dependante de diversaj kaŭzoj.

Mia tiea korespondanto, s-ro Harding, la plej granda bulb-sem-kreskiganto en la lando kaj pro tio nomata »La reĝo de bulbsemo«, rakontis al mi pri iliaj malfacilaĵoj. La neesperantistoj ĉiam argumentas jene: »Esperanto neniam utilos al ni insulanoj, izolitaj de la cetera mondo, ni tre malofte povas alilanden vojaĝi kaj eksterlandanoj ne multe vizitas nian landon, kaj krome pro la longaj distancoj, pro kio mi do lernu la lingvon, la sola nur por korespondado?«

Tiajn kaj similajn argumentojn mia amiko, kiu estas ege fervora esperantisto, ofte devas aŭdi propagandante por nia lingvo. Kaj la argumentoj ja estas por tiu lando pravaj. Sed nun naskiĝis ĉe mia amiko novan ideon per kiu li esperas sukcesi al la Novzelandanoj pruvi la utilon kaj taŭgecon de Esperanto.

Li alskribis siajn eksterlandajn korespondantojn, ĉu ili povos por li vendi kelke da bulbsemo el speco facile kulturebla en niaj regionoj. Mi jam mendis funton da semo kaj kolektis kelkajn aĉetantojn, kaj do ŝajneble lia projekto por propagando realigebla estas, kaj ni do esperas ke la rezulto ankaŭ inter la neesperantistaro en lia lando estos bona por la lingvo. Ĉar poste li petos de la aĉetintoj atestojn pri la rezulto de la semado, kiujn li intencas publikigu kune kun propaganda artikolo pri la lingvo, en la gazetaro de sia hejmlandano. Per tiu ĉi maniero li esperas venki la kontraŭulojn kaj persvadi ilin lerni la lingvon.

La semo kiu portas la nomon »Bruna Deptford« venos komence de aprilo, esperantistoj kiuj interesigas pri la semo kaj kiuj volas helpi al nia Novzelandano samideano realigi lian novan ideon por pruvi al siaj samlandanoj la taŭgecon de Esperanto kiel komerca lingvo, povas ricevi specimenojn de la semo po 5 gramoj sendante 20 oerojn en poŝtmarkoj (Bulbsemo 200 po gramo). Samideane

Erik Fredin

Selleberga B j u v

Ĉie, Ĉiel, Ĉiam

mi volas subteni Esperanton, diris la tre simpatia aŭstra ministro Stockinger dum vizito en Stockholm. La nun kreskanta junularo ne havos monon nek tempon por multa lingvostudado, do ili lernu Esperanton, kiu krome laŭ mia opinio havos grandan signifon por la paciĝo de la mondo kaj la interfratiĝo de la popoloj. Mi klopodus ĉiam por la enkonduko de Esperanto en la diversaj lernejoj, precipe en la komercaj. Tiun temon mi tre detale pritraktos en la internacia konferenco en Vieno dum venonta Pentekosto. Mi esperas ke vi sendos reprezentantojn de Svedujo, kie oni ja tre favoras Esperanton en multaj rondoj.

Ni deziris sukceson al tiu grava konferenco kaj li diris: Ĝis revido en Vieno.

SJn.

— ★ —

S. O. S.

estas internacia helporganizo tute privata, kiu celas sisteman kunlaboron sur la radia kampo. Precipe en Anglujo kaj Francujo ĝi havas multajn membrojn; en Svedujo bedaŭrinde neniu. Do mi alvokas: aliĝu. Kosto: 1 ŝilingo. Ligilo: ĉiumonata informilo. Devo: raportoj pri aŭskultitaj elsendaĵoj sur karto kaj precipe al tiu stacio por kiu la Informilo atentigas en la koncerna monato. Ni svedoj, kiuj tiom ŝuldas al la eksterlando pro bonaj sendaĵoj, ĝis nun ne sufiĉe dankis aŭ pagis por efika subteno. Tiu subteno konsistas nur en dankleteroj aŭ simplaj kartoj kun nomo kaj adreso. Per tiuj vi montras vian intereson, kion multaj stacioj tre ŝatas — la sveda centro ŝajne malpli ol aliaj — kaj vi instigos ilin al plua sendado. Per proponoj vi povas helpi ilin pli kaj pli valorigi la esperantan parton de la programoj.

Do aliĝu al SOS. Bonvolu, por ke ni sciu, kiom el vi volas tiel propagandi, sendi poŝtkarton kun adreso al Sam Jansson, Skogen 23, Lidingö 1. Poste ni elektos landan reprezentanton, kies devo estos per gazeto informi pri gravaj radioaferoj kaj kolekti la kotizojn por kuna kaj tiel pli malkara transsendo al la Informejo.

★

Vem vill hjälpa till att göra Sverige känt i Danmark?

Undertecknad, som f. n. leder kurser i esperanto här på Jylland, vill härmed göra en vädjan till alla Sveriges esperantister att sända lämpliga vykort från historiska och andra sevärda platser i Sverige. Avsikten med denna vädjan är den, att genom förevisning av dessa kort såsom ljusbilder göra vårt vackra land känt för danskarna samt samtidigt genom mängden av erhållna bilder ge en föreställning om esperantos utbredning i Sverige. Därför uppmanas alla, som läsa detta, att sända minst ett vackert vykort från sin hembygd, med uppgift om ortens läge, folkmängd och historiska minnen m.m. Som vedergällning erhåller var och en minst ett vykort ifrån Danmark.

Därför, kära meningsfränder runt Sveriges land: Sänd snarast möjligt edert bidrag till denna bildserie och visa därmed också esperantos utbredning i vårt land!

Gillis Staberg.

Adress: Djurslands Højskole
Trustrup st. Danmark.

Jubileo en Esperantujo!

La »Germana Esperanto-Librejo en Leipzig C. 1, Hospitalsstrato Nr. 2» ekzistis je la dua de Januaro 1934 *dudek kvin jaroj*. Post la fondo de la Saksa Esperanto-Instituto (nuntempe: Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko) la librejo estas fondita en la metropolo de la Libro-komerco por la tuta mondo de la, en Esperantujo konata pioniro samideano Bernhard Kötz (Honora membro kaj delegito de U.E.A.) La firmo sukcesis per sia rapida, akurata kaj librofakista servigo kontentigi multajn literatur-âcetantojn el la tuta mondo. Per la eldono de katalogoj kaj prospektoj ankaŭ ĉi tiu komerc-domo sendube agis propagande por la esperanto-movado. La nun aperinta specialoferto (maloftaĵoj kaj antikvaĵoj) estas interesa por ĉiu libro-amiko. Mendu ĝin.

U. E. A:s

årsbok (med värdefulla adress- och andra uppgifter om esperantorörelsen i hela världen) erhålles mot inbetalandet av 4 kr. Årsboken jämte månadstidningen

Esperanto erhålles mot 10 kr. Insändes till Svenska Esperanto-Förbundet, postgiro 2012, Stockholm.

Esperanto i Levanten.

Vid »Levantiska Mässan» i Tel-Aviv i Palestina, en varumässa, som kommer att äga rum den 26 april — 26 maj i år, kommer en esperantoutställning att ordnas av esperantoklubben i Jerusalem. Så vitt vi ha oss bekant är det första gången en esperantoutställning anordnas i Levanten, och då mässan i Tel-Aviv har utställare från de mest avlägsna länder — t. o. m. Sverige kommer att bli representerat — bör denna esperantoutställning kunna få en publik, som skulle ha verkligt gagn av esperantos genomförande.

Verdaj Rokoj.

Ĝis nun aliĝis al nia rokaro la kluboj en Borlänge, Höör, Nybro, Visby, Västervik kaj Örebro. Al ĉiu koran dankon!

La celo de la helpocio Verdaj Rokoj estas havigo de mono por ebligi al la Sveda Esperanto-Federacio havi propran sekretariejon. Ĉar la kotizo estas malalta, nur unu krono po monate, ni esperas ke pli multaj kluboj aliĝos kiel rokoj. »Roketo».

Matrikeluppgifter

insändas till oss före den 1 mars å de utsända formulären.

S. E. F:s sekretariat

Den flygande utställningen

har gjort stor succè. Ett 5-tal platser ha redan haft utställningen och varit mycket belåtna. Flera orter ha ytterligare beställt den. De platser, som ha intresse för saken, böra i god tid inkomma med beställning att få låna materialet.

S. E. F:s sekretariat


Esperantovägvisare på stationen.

Järnvägsstyrelsen i Checkoslovakiet har meddelat landets esperantoorganisationer tillstånd att på alla järnvägsstationer i landet uppsätta anslag om, var och när esperantoklubbarna ha sammanträden och enskilda esperantister och Universella Esperanto-Förbundets delegerade m. fl. kunna träffas. Esperantoförbunden ha i första hand uppsatt ett tusen sådana anslagstavlor.

VERTIKALE:

1. Faras parton de la laboro.
2. Arbo.
3. Korta birdo.
5. Nekovrita.
6. Herorakonto.
7. Impresas la flarsenton.
9. Pli valoras tuj — ol poste bovo.
10. Martelo.
13. Aŭskultaparato
14. Sur lakto.
17. Flugarto.
18. Senrajte proprigi al si.
20. Estas la hepato kaj ĉi tiu gazeto
21. Kapabla al konsekvenca rezonado.
23. Cifero.
24. Membro.
26. Infanoj.
27. Rektangula.

Krucvortenigmo n:o 3.



Ĉiuj vortoj kun gramatikaj finaĵoj.

HORIZONTALALE:

1. Portas sian do-

mon sur la dorso.

4. Palpokorno.
8. Formo de poezio.
10. Malsaĝegulo.
11. Ovoforma.
12. Speco de cervo.
14. Unu el kvar koloroj.
15. Tia ŝlosilo ĉiun pordon malfermas.
16. Kaŭze de.
18. Individuo.
19. Ŝlosilo de la koro.
22. Ujo.
25. Knabo sen gepatroj.
26. Sanktulbildo.
28. Saltanta besto.
29. Plibelige aranĝi
30. Restadejo por venenfumantoj.
31. Bonvola, helpopreta kaj indulga.

Extra kursblad till korrespondenskursen.

Då radiokursen i esperanto förbereddes, utarbetade rektor Sam Jansson en serie extra kursblad med förklaringar och exempel till Svenska Esperanto-Förbundets elementärkurs för att ytterligare underlätta studierna. Som bekant inhiberades radiokursen, men de utarbetade kursbladen ha nu utgivits i ett särskilt häfte som kan erhållas till ett pris av 50 öre. Det kommer i fortsättningen att utsändas till dem som beställa korrespondenskursen (i utbyte mot läseboken Esperanto-Kurso). De som redan ha korrespondenskursen kunna rekvirera häftet med kursbladen från expeditionen.

De som ej erlagt prenumerationsavgiften för Svenska Esperanto-Tidningen 1934 erhålla i dessa dagar ett postförskott. Vi hoppas att få behålla alla våra prenumeranter från förra året även i år. Lös postförskottet genast vid ankomsten så att det inte blir bortglömt!

A T E N T U !

La unuan fojon okazos Esperanta ekspozicio en Palestino. Ĝi povas grave helpi nin en nia batalo por Esperanto. Ni petas la samideanojn, grupojn kaj eldonejojn sendi esperantaĵojn al la adreso de nia delegito, P. Laĥovicki, ingeniero, Kerem, Jerusalem.

Unika lernolibro!

Universala Esperanto Metodo.

De Doktoro Benson.

Enhavanta rektan lernolibron, ampleksan ilustritan legolibron, universalan multlingvan bildvortaron.

41 lingvoj, 11,000 bildoj. 100 listoj de sam-specaj vortoj. 2 plenpaĝaj tabeloj de la pronocado de la Esperantoalfabeto en 36 lingvoj. 5 plenpaĝaj tabeloj de la korelativoj en 36 lingvoj.

559 paĝoj. Fortike bindita. Prezo 20 kr. ELD. SOC. ESPERANTO, Stockholm 1.

Propagandafonden.

Helena Petterson, Östersund 5:—
Lisa Widlöf, Karlsborg 1:—
Herm. Fredriksson, Norrköping .. 5:—

In- och Utländsk
Litteratur

Esperantoavdelning
Nya Aktiebolaget Biblioteksbookhandeln
Biblioteksgatan 12, Stockholm

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTOS OMBUD



- Alunda:* Gösta Eriksson, Klev.
Arboga: Carl Erik Bergström, Egebo.
Arbrå: Walfrid Johansson.
Billesholms Gruva: Nils Welander.
Boden: Hjalmar Pettersson, Parkg. 22.
Borås: Viktor Ekström, Söderkulla 33.
Boxholm: Knut Hallin, Storg. 10.
Ekestad: Birger Larsson, Box 19.
Eksjö: L. Pehrsson, Sydbanken.
Enköping: Emanuelssons Pappershandel, Kungsgatan 16.
Eskilstuna: H. Sandbergs Bokhandel.
— B. Chressman, Vinkeln 1312.
Fagersta: Birger Eklund, Järnvägen.
Falkenberg: John Larsson, Box 40.
Falköping: G. A. Tholin, Linnégat. 1.
Falun: Einar Anselius, Åsgatan 86.
Fyrunga: Erik Brenander.
Gislaved: P. B. Carlson, Storgatan 7.
Grums: Georg Nordling.
Gyttorp: Thure Johnzon.
Gävle: G. Bengtsson, Tullkammaren.
Göteborg: N. J. Gumperts Bokhandel.
— Erik Ekström, Vegagatan 10.
Hallsberg: Erh. Wärn, Box 925.
Halmstad: J. M. Ahlström, Köpmansg. 2.
Heby: Leander Ström, Strömsvik.
Hudiksvall: H. Svensson, Håstavillan 10.
Hälleforsnäs: Elof Larsson.
Hällekis: Elis Andréason.
Hällevik: H. Ysner.
Hälsingborg: Hedéns Bokhandel.
— Killbergs Bokhandel.
— Lisa Larssons Bokhandel, Södergatan 17
— G. Henriksson, Brommagat. 32.
Härnösand: A. A. Sjölund, S. Brännan.
Hässleholm: Fru Elin Fors, Österg. 28.
Höganäs: Per E. Nilsson, Långgatan 6.
Höör: Billingska Bokhandeln.
Jönköping: Knut Jensie, Kanalgr. 57.
Karlskoga: Sune W. Ahlm, Kanong. 673.
Karlskrona: K. L. Nilsson, Ehrensvärdsgatan 5.
Karlstad: H. Jonsson, Box 76, Råtorp.
Katrineholm: Elof Ohlsson, Fredsg. 43.
Kavlds: Erland Björkman, Kungslena.
Kil: H. Nordling, Järnvägsstationen.
Kilafors: Martin Berglund, Frivy.
Kiruna: Aron Nilsson, Kv. 123—7.
Klippan: Karl Nilsson, 511.
Kumla: Fritz Ström, Box 139.
Kvicksund: Holg. Ekblad, Skogsbacka.
Kvitsleby: Torild Grönlund.
Kävlinge: Malte Smith, Bruksgatan 13.
Landskrona: E. Olsson, Hantverkareg. 19.
Lidköping: Otto Lindvall, Vinbergsg. 10.
Linköping: Harry Nilsson, Trångg. 6.
Ljusne: Holger Svensson, Box 423.
Luleå: E. Blomkvist, Box 807, Skurholmen.
Lund: Olle Olsson, Arkivgatan 12.
Malmberget: J. Lalander.
Malmö: Börje Persson, Amiralsg. 36.
— Karl Österholm, Agnesgatan 7.
Mora: G. H. Johansson, S. J. 2.
Motala: C. Hallros, Bispmot. Handelstr.
Motjärnshyttan: Yngve Nordström.
Munkedal: J. A. Hansson.
Munkfors: Boris Ekvall, Bl. 297.
Mölnlycke: Eric Brandin, Ericstro.
Norrköping: J. Pihlström, S. Promen. 19.
Nybro: K. F. Lindqvist.
Nynäshamn: Ernst Ek, Stathmosv. 2.
Porjus: Ossian Lundberg, Postlåda 150.
Råsunda: V. Appelkvist, Stråkv. 64, II.
Sandviken: Sven Wallner, Box 3124.
Sjoberga: Walter Johansson, Höjen.
Skara: G. A. Stahberg.
Skutskär: Evert Kjellin, Stadsplan 91-4.
Slöinge: J. A. Nord.
Stenstorp: Hugo Sköld.
Stockholm: Förlagsföreningen Esperanto, Sveavägen 98, 5 tr. Tel 31 65 01.
— Biblioteksbokhandeln, Biblioteksg. 12.
— Bokhandeln, Mästersamuelsgatan 62.
Storuman: Gunnar Carlsson, Box 26.
Strömsbro: Nils Larsson, Vretbacka.
Sundsvall: Th. Farm, Epidemivägen 5.
Svedala: Henning Bengtsson.
Södertälje: Eric Grahn, Algatan 23.
Tidaholm: Nils Brobeck, Bäcksg. 7.
Tierp: Gösta Eriksson, Box 600.
Torsby: Gunnar Svensson, Box 68.
Torskors: Frithiof Ahnfeldt, Inglatorp.
Trollhättan: Sven Nydén, Nygatan 2.
— Allan Hälls Pappers- & Musikhandel.
Trälleborg: O. Hj. Olsson, Repslagareg. 8.
Uddevalla: E. Dahl, Ridhusgat. 6.
Umeå: Åkerbloms Bokhandel.
Uppsala: Fritz Lindén, Auroragatan 12.
Varola: Sven Strand, Nykvarn, Törnes-torp, Skövde.
Visby: Vessman & Petterssons Bokhandel, Adelsgatan 5.
Värtan: Gerhard Johansson, Järnvägen.
Västerås: G. Nilsson, Kryddgårdsgat. 12.
Atvidaberg: Walter Söderqvist, Sunnebovägen 2.
Öbacka: Åkerbloms Bokhandel.
Örbyhus: Petrus Fredlund.
Örebro: Sigurd Ekendahl, Klostergat. 27.
Örnsköldsvik: C. E. Backlund, Nyg. 37.

Första delen av den nya, stora

svensk-esperantiska ordboken

är nu färdig.

Utarbetandet av ordboksmanuskriptet har tagit mycket längre tid än någon kunde förutse, när arbetet började. I gengäld blir ordboken mera omfattande och grundligare genomarbetad.

Första hälften föreligger nu. Då det är många som mycket ivrigt vänta på den nya ordboken, kommer den att säljas i två delar för att första delen omfattande bokstäverna a—m, skall kunna komma till användning omedelbart.

Priset på första delen är (häftad) 3 kr.

(Ordboken kommer att säljas *inbunden i ett band* först när hela boken föreligger färdig.)

Obs! Ingen merkostnad uppstår genom att boken köpes i två delar. Priset för ordboken häftad *i en volym* kommer att bli lika med sammanlagda priset för de två delarna.

Pri

Esperantisk-svensk ordbok

de Paul Nylén

skribas la alte taksata gazeto »*Brita Esperantisto*» la jenon: »Jen dense presita kaj ĉiel modela kaj praktika vortaro verkita de la plej eminenta sveda Esperantisto. Ĝi sendube estos helpilo netakseble valora por la sveda Esperantistaro. Alilingvaj samideanoj ankaŭ trovos ĝin tre konsultinda.»

Prezo: Broŝ. sved. kr. 3:75, bind. kr. 5:—.

Pri

La infanoj de Betlehem

de Selma Lagerlöf

skribas »*Nederlanda Esperantisto*»: »Komentinte la legadon de tiu ĉi delikata kaj kortuŝa rakonto, oni nepre ne haltas antaŭ la fino. Kaj tiam oni ne scias, kion plej multe admiri, aŭ la talenton de l' fama verkistino, aŭ tiun de la tradukisto, kiu faris el ĝi esperantan juvelon.»

Prezo: sved. kr. 0:75.

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.
Box 698, Stockholm 1. Postgiro 578.

